

Pri Reenkarniĝo

Bedaŭrinde ekzistis en la pasinteco kaj ekzistas ankoraŭ en la nuntempo maltoleremo kaj malamo inter anoj de malsamaj religioj, kaj eĉ okazis religiaj militoj - kvankam la fondintoj de tiuj religioj predikis nur toleremon, amon kaj pacon.

Bonŝance ŝajnas esti nuntempe pli da toleremo kaj interkompreno inter la ĉefroluloj de la religioj ol pasinteco.

Mi faris tiun enkondukon al ĉi tiu artikolo pri reenkarneco, ĉar mi volas emfazi, ke necesas toleremo, ke ĉiu religiano kaj religianino povas kredi je tio, kion lia/ŝia religio instruas, ke mi neniel intencas persvadi iun ajn pri reenkarneco. Mi volas nur montri kelkajn faktojn pri tiu kredo.

Reenkarneco "estas laŭ kelkaj kredoj proceso per kiu animo revenas post morto al Tero per nova korpo por nova vivo" (E-Vikipedio).

Multaj indiĝenaj triboj kredis kaj kredas je reenkarneco, sed mi mencias – ĉefe – nur la grandajn religiojn.

Laŭ brazilano kiu baziĝas sur libro, kiu siavice citas la *World Christian Encyclopedia* (Monda Kristana Enciklopedio), ĉirkaŭ du trionoj de la monda loĝantaro havas tiun kredon. (<http://universoespirita.blogspot.com.br/2011/01/bilhoes-de-pessoas-pelo-mundo-acreditam.html>)

Ĉu tio veras? Ĉu la informoj de la enciklopedio estas ĝustaj? En artikolo, en kiu estis taksita la religia konsisto de la datumbazo de la "Monda Kristana Enciklopedio", la aŭtoroj asertas, ke ili komparis ties informojn kun tiuj de kvar aliaj fontoj kaj konstatis, ke la taksoj alte koincidas (<http://onlinelibrary.wiley.com/doi/10.1111/j.1468-5906.2008.00435.x/abstract>) . Sed eblas, ke la informo de la libro menciita de la brazilano estas erara. Ŝajnas al mi, ke du trionoj estas troigo.

Ĉiukaze ne estas klare, ĉu oni kalkulis nur la nombron de la anoj de la religioj kaj sektoj, kiuj defendas reenkarnecon, aŭ ĉu la nombro ampleksas ankaŭ homojn, kiuj kredas je reenkarneco kontraŭ la instruoj de sia religio. Fakte tio lasta povas okazi: kvankam la katolika kaj protestanta eklezioj estas kontraŭ reenkarneco, multaj kristanoj kredas je ĝi: en Eŭropo averaĝe 20-25%, en Brazilo eĉ 40%.

Poste mi serĉis aliajn informojn en la interreto kaj trovis, en franca artikolo pri “Stato de la esploro pri reenkarneco” (<http://www.agoravox.fr/tribune-libre/article/etat-des-lieux-de-la-recherche-106995>) la jenajn nombrojn:

Pli ol duono de la monda loĝantaro kredas je reenkarneco, kaj la nombro plialtiĝas ĝis 75% inter la homoj, kiuj havis “sperton de baldaŭa morto”.

Kiuj estas la ekzistantaj religioj, kiuj defendas reenkarnecon?

La plej antikva estas hinduismo. Ĝia aĝo estas polemika (t.e. la opinioj de okcidentaj esploristoj kaj de hinduoj tre malsamas), sed oni ne dubas, ke ĝi estas la plej antikva. Larĝasence ĝi komenciĝis per la veda religio. Je la fino de la veda erao estis komponitaj – ekde ĉirkaŭ 800 a.K. – la Upaniŝadoj, kiuj jam pritraktis reenkarnecon. Hinduismo ampleksas diversajn religiajn tradiciojn, sed la plejmulto de la ĉirkaŭ 1,1 miliardoj da hinduoj kredas je reenkarneco.

La dua plej antikva el la plej grandaj religioj kiuj kredas je reenkarneco estas budhismo. Sidarto Gotamo, aŭ Gotama Budho, naskiĝis en hindua familio, sed - post sia iluminiĝo (ĉirkaŭ 500 a.K.) – li predikis novan, tute malsaman religion: budhismon. Estas ĉirkaŭ 500 milionoj da budhistoj en la mondo.

Sed jam ekde iomete antaŭ la apero de budhismo ekzistas ĝajnismo, kies ĉirkaŭ 2 milionoj da anoj – la plejmulto loĝantaj en Hindio – ankaŭ kredas je reenkarneco.

Multe pli malfrue, t.e. en la 15-a jarcento p.K., aperis siĥismo. Ĝiaj 23 milionoj da anoj vivas plejmulte en la hinda subŝtato Punĝabo.

En la 19-a jarcento estis fondita de la franco Allan Kardec la spiritismo, kies plejmultaj anoj estas brazilanoj, ĉirkaŭ 4 milionoj. La spiritistoj kaj ankaŭ parte de la afrikdevenaj religioj en Brazilo (Kandombleo kaj Umbando) kredas je reenkarneco (eble 1 miliono).

Fine multaj sektoj kaj grupoj de la tiel nomata “Nova Epoko” havas tiun kredon.